

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1088 (15/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Kjara, la cantautrice dell'Esperanto	2
- Cosa si dice in Europa	2
- Il museo tattile "Omero" di Ancona	2
- Por tricentmil artikoloj en Vikipedio ĝis julio 2021	4
- Corso dell'OMS sul Covid, in Esperanto	5
- Babilrondo Romo-Parizo.....	5
- Prezento de eldonoj de Kroatia E-ista Unuiĝo	5
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	6
- Internacia Esperanto Arkivo	7
- Il Manifesto per la Terra	9
- Pillole di Salvezza 1088: Esperanto-Vivo	10

KJARA, LA CANTAUTRICE DELL'ESPERANTO



Il 14 aprile è uscito il nuovo disco di Chiara Raggi, nella vita reale Kjara. In questo bell'articolo, pubblicato su un magazine digitale romagnolo, scopriamo molte cose su di lei, la sua musica, e l'Esperanto. https://www.gagarin-magazine.it/2021/04/musica/il-nuovo-brano-in-esperanto-di-kjara-mozaiko/?fbclid=IwAR2LY-OIqxt2ZvOW4O8d9QG9x9h5NVyvcWiN_isS5XwIGs2S8L5KH1LY6VY

COSA SI DICE IN EUROPA?

La Conferenza sul futuro dell'Europa raccoglie idee, proposte, temi di discussione, per ragionare su sfide e priorità europee. Date un'occhiata qui, e pensate a cosa e come si possa proporre.

<https://futureu.europa.eu/?locale=it>

IL MUSEO TATTILE "OMERO" DI ANCONA

Il Museo Omero consolida e amplia i legami con l'estero grazie anche alla lingua più internazionale che esista, l'esperanto. Il presidente **Aldo Grassini ha rilasciato un'intervista in esperanto a China Radio International**, il servizio radiofonico della Repubblica Popolare Cinese tradotto in sessantacinque lingue. Ad intervistarlo è stata **Alessandra Madella** e ancora una volta il protagonista è il Museo, la sua missione, il

suo essere un esempio di inclusione, integrazione e accessibilità, obiettivo raggiunto con non pochi sacrifici e lunghe attese. L'intervista, presto tradotta anche in cinese, sta riscuotendo l'interesse degli esperantisti di tutto il mondo e la speranza è quella di aprire future collaborazioni con i musei cinesi.

Grazie alla comunità esperantista, di cui fanno parte anche i fondatori del Museo Omero, Aldo Grassini e sua moglie Daniela Bottegoni, recentemente è giunto in dono al Museo il **modello architettonico della cattedrale di Brasilia**. A donare il manufatto in legno è stata la **Fazenda – Escola Bona Espero**, realtà che si trova a 250 chilometri a nord di Brasilia, nel mezzo della savana. Fondata e gestita da esperantisti la Fazenda è nata come comunità per bambini poveri del Brasile e oggi è un centro culturale.

Anche in campo formativo, il Museo Omero ha di nuovo varcato il confine italiano tenendo un corso online in francese per operatori museali belgi, corso organizzato dall'**associazione "La Lumière" di Liegi**, da cento anni al servizio delle persone non vedenti.



La tecnologia ha avuto il suo ruolo anche per intercettare **Andrea Bocelli** che dal deserto di Dubai si è collegato per portare il suo saluto all'evento organizzato dal Museo Omero per il centenario di **Franco Corelli**. **Bocelli** ha ricordato il tenore anconetano con parole di affetto: "Da ragazzo ho consumato i suoi dischi – così, Bocelli – mentre anni dopo ho avuto la gioia di diventare suo allievo, instaurando un rapporto di stima reciproca e, da

parte mia, di vera e propria devozione. Siamo ciò che riusciamo a donare: ce lo ricorda anche il grandissimo Maestro Corelli, che resta vivo nel cuore di chi ne ha inteso la voce".

Museo Tattile Statale Omero –

Mole Vanvitelliana

Banchina Giovanni da Chio 28

60121 Ancona

tel. 071.2811935

www.museoomero.it

info@museoomero.it

POR 300 000 ARTIKOLOJ EN VIKIPEDIO ĜIS JULIO 2021

UEA partnere kun ELiSo (Esperanto kaj Libera Scio), ILEI kaj E@I alvokas vin al verkado en la Esperanta Vikipedio por komune atingi 300 000 artikolojn ĝis julio 2021. Vi povas samtempe ankaŭ partopreni Vikipediajn konkursojn kaj gajni valorajn premiojn. Vizitu la paĝon de la "[Kampanjo 300 000](https://esperanto.wiki/projektoj/vikipedio-300-000)" (esperanto.wiki/projektoj/vikipedio-300-000) por lerni kiel vi mem partoprenu. Alternative subtenu la Vikipedian agadon per donaco al la Fonduso Instigo-Liberapay (www.instigo.be), kunordigita de la komisiito de UEA pri reta agado, Yves Nevelsteen. La! fonduso bezonas atingi la celon de 100 EUR semajne favore al aliaj retaj agadoj. "Kampanjo 300 000" ankaŭ subtenas unu el la projektoj de UEA oficiale agnoskitaj de Unesko por disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto, nome tradukado de Unesko-prezentaj Vikipediaj artikoloj al Esperanto.

ELiSo, referencata ankaŭ kiel VMEO (Wikimedia Esperanto), estas oficiala grupo de Esperanto-parolantaj vikimedianoj agnoskita de Fondaĵo Vikimedia la 4-an de aprilo 2013. En 2019 ĝi fariĝis registrita organizo, kun sidejo en Slovakio. Kun UEA la grupo elektis la datojn de la 106-a Universala Kongreso (UK), planata por okazi en Belfasto, kiel celdaton por atingi la markon de 300 000 artikoloj. Ĉiuj estas alvokataj kunlabori. Registriĝu aŭ reaktiviĝu kiel redaktanto. Bonaj okazoj por verkado estas la Vikipedia konkurso pri centra kaj orienta Eŭropo, finiĝanta ĉi-aprilon, kaj la venonta konkurso, en majo, pri Afriko. Pri tiu lasta kunlaboras la Afrika Komisiono de UEA, kun aldona celo premii novajn redaktantojn el Afriko kaj akceligi la etoson por la UK planata por Afriko en 2024. Kontraŭ nur 3 EUR eblas akiri la [manlibron](https://manlibron.org) "Vikipedio por vi: kiel ĝi funkcias, kiel vi kontribuas" (katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8113).

“Kampanjo 300 000” festas la 20-jariĝon de Vikipedio, kiu inaŭguriĝis la 15-an de januaro 2001 kiel interreta plurlingva enciklopedio laŭ koncepto de libera verko kaj verkado surbaze de volontula amaskunlaboro, ĉiam konforma al enciklopedieco, neŭtraleco kaj respekto. Ĝi disponeblas jam en pli ol 320 lingvoj, kun pli ol 330 000 aktivaj uzantoj kaj pli ol 56 milionoj da artikoloj. Natura ligiteco inter la valoroj de Esperanto kaj Vikipedio rezultis, ke jam en la 6-a de novembro 2001 aperis la versio en Esperanto, fondita de la usona esperantisto Chuck Smith. La Esperanto-versio havas jam pli ol 295 000 artikolojn, pli ol 380 aktivajn redaktantojn kaj ĝuas pli ol 117 000 unikajn vizitantojn monate. Laŭ deveno de redaktantoj ĝi estas el ĉiuj lingvoversioj la plej internacia Vikipedio kaj ankaŭ la entute plej granda enciklopedio verkita en artefarita lingvo.

Efektive esperantistoj ludas pli gravan rolon en la Vikipedia projekto ol oni ĝenerale taksas. Unua dungita teknikisto de la tutmonda Vikipedio, Brion Vibber, estas mem esperantisto. Esperantistoj kontribuis ankaŭ al la fondiĝo de kelkaj pliaj lingvoversioj de Vikipedio: la ĉeĥan, kartvelan, slovakon kaj svahilan versiojn de Vikipedio kreis respektive la esperantistoj Miroslav Malovec, Avtandil Abuladze, Viliam Búr kaj Marcos Cramer. En pluraj Vikipedioj esperantistoj estas administrantoj, inter ili la prezidanto de ELiSo Michal Matúšov (KuboF Hromoslav). Fine la enkonduko de subteno por la Esperanta alfabeto en januaro 2002 malfermis la vojon por la alfabetoj de aliaj lingvoj kaj plifruigis la transiron de la tuta Vikipedio al la normo Unikodo.

UEA kaj ILEI agnoskas la laborojn de tiuj kaj ĉiuj esperantistoj kaj same agnoskas la signifon de Vikipedio por la konservo de la historio de Esperanto.

CORSO DELL'OMS SUL COVID, IN ESPERANTO

A questo link troverete un corso, prodotto dall'Organizzazione Mondiale per la Sanità, sul Covid: in Esperanto!

<https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19>


BABILRONDO ROMO-PARIZO


Ni festu laboron ! 10a babilrondo de la ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo. Okaze de sia 10 babilrondo, la ĝemelaj urboj Romo kaj Parizo festos laboron. Ĉu vi laboras nun ? Kiun profesion vi havas ? Ĉu vi ŝatus ŝanĝi vian laboron ? Kion vi planas ? Ĉu vi emeritiĝis ? Rakontu al ni vian profesion, metion aŭ emeritiĝon. Ĉiuj esperantistoj estu bonvenaj! La kunveno okazos la unuan de Majo per Zoom: <https://us02web.zoom.us/j/82236406476?pwd=MVFZSVh2amNlazB1a0g0WW9HZktZZz09>

ID kunveno: 822 3640 6476 - Pasvorto: 376513

PREZENTO DE LA ELDONJOJ DE KROATIA E-ISTA UNUIĜO

Bedaŭrinde, malgraŭ tiu ĉi anonco ja alvenis ĝustatempe, mi havis retproblemon dum pluraj tagoj, do mi vidis ĝin tro malfrue por korekte anonci. Pardonpetante al la organizantoj, mi tamen volas proponi ĝin ĉi tie, por montri agadon kaj agemon de niaj samideanoj.




HRVATSKI ESPERANTSKI SAVEZ
KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO
Hrvatski Esperantski Savez
Kroata Esperantista Unuiĝo

**NOĆ KNJIGE
NOKTO DE LA LIBRO**

*PREDSTAVLJANJE IZDANJA HRVATSKOGA ESPERANTSKOG SAVEZA
PREZENTO DE LA ELDONJOJ DE KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO*

*OTVORANJE MEDUNARODNOG NATJEČAJA U PREVOĐENJU 2021
LANĜO DE LA INTERNACIA TRADUKKONKURSO 2021*

*OTVORANJE PROSLAVE 100. GODIŠNJICE ROĐENJA LUCIJE BORČIĆ
LANĜO DE LA 100-A JARA DATDEVENO DE LA NASKIĜO DE BUCIJA BORČIĆ*


SUDJELUJU / PARTOPRENAS:
PROF. ĐURO VIDMAROVIĆ (HRVATSKA/KROATIO)
PROF. CHRISTIAN MOCANU (RUMUNUSKA/RUMANIO)
EDVIGE ACKERMANN (ITALIJA/ITALIO)
MARIJA BELOŠEVIĆ (HRVATSKA/KROATIO)

23. travnja 2021. / 23-a de aprilo 2021.
17.00 sati (UTC+2)
Platforma ZOOM

Prijave/aliĝoj:
hes.keu@gmail.com

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON

Catullo forse non sarebbe contento di essere finito nei bigliettini dei cioccolatini, ma meglio conoscerlo così che ignorarlo. A meno che non siate francofoni, nel qual caso, invece di Catullo, vi trovereste a leggere De Saint Exupéry, visto che il testo in francese viene dal Piccolo Principe.



INTERNACIA ESPERANTO-ARKIVO

Mi ricevis tiun ĉi peton por kunlaboro, kaj taksis ĝin interesa. Tio iel konkurencas kun nia nacia arkivo en Massa, sed bonas, laŭ mi, ke ni konsciis pri similaj projektoj tra la movado. Kaj la historio malantaŭ la projekto estas interesa.

Nova Internacia Esperanto-Arkivo celas konservi la originalan Esperanto-heredaĵon por eterne.

I Historio

A Fondaĵo Vanbiervliet

La fondaĵo originas el la persona kolekto de Cesar Vanbiervliet (1905-1992), urba oficisto de Kortrijk (Belgio), kiu post la pensiigo reaktiviĝis kiel esperantisto kaj sukcesis lokigi sian personan esperanto-kolekton en la urba biblioteko. La kolekto rapide kreskis kaj ĉirkaŭ 1990 ĝia amplekso ĝenerale estis menciita kiel "10.000 libroj kaj 10.000 jarkolektoj de revuoj". Post la morto de Cesar nur en 1995 ekestis nova skipo de volontuloj. Bedaŭrinde la praktika subteno de la Fondaĵo iom post iom malkreskis ĝis nur restis la gastigado en ne tre komforta laborejo. Konsilanto de la urbo en raporto prezentita en 2012 i.a. menciis la Esperanto Fondaĵon, kiu laŭ li ne plu estu subtenata de la urbo. En la iam konstruota nova biblioteko ne plu estos loko por ĝi. Por ĝi tamen estis trovita solvo: la antverpena Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience. Poste ĝi akceptis transpreni ankaŭ grandan parton de la Fondaĵo Vanbiervliet. Parto de la restintaj libroj kaj revuoj iris al KADOC (Leuven), al AMSAB (Kortrijk) kaj al lokaj arkivoj.

Ĉio kio restis, same de originaloj kiel de duoblaĵoj, kuniĝis kun la kolekto de Marc Vanden Bempt.

B Kolekto Marc Vanden Bempt

Marc komencis aĉeti kaj gardi librojn nur ĉirkaŭ 1985. Ankaŭ revuojn li gardis, sed malpli aktive. La plej grandaj kreskoj estis pro aĉetado de brokantaĵoj, precipe ĉe UEA kaj FEL. Tra la jaroj pluraj esperantistoj transdonis sian Esperanto-bibliotekon aŭ parton de ĝi al ĉi tiu kolekto. En 2016 Marc komencis transpreni duoblajn revunumerojn de Kortrijk. En la sama jaro li ankaŭ transprenis aron da revuoj de loka grupo en Valenciennes. En decembro 2018 la biblioteko CDELI en la Chaux-de-Fonds transdonis siajn duoblaĵojn. En 2014 kaj precipe en 2019 estis interŝanĝoj kun la biblioteko en Herzberg, al kiu iris granda nombro de duoblaĵoj. En la jaroj 2010-2020 ekestis kontaktoj ankaŭ kun bibliotekoj en Hispanio, Brazilo, Japanio kaj Francio pri interŝanĝado. En 2020 la fondaĵo Vanbiervliet devis likvidiĝi. Post la transprenado, fine de 2020 tiel estis 13.175 libroj, 7.520 plenaj revujaroj (de 960 titoloj) kaj 4.907 neplenaj revujaroj (de aldonaj 407 titoloj). Aldoniĝis miloj da duoblaj libroj kaj revunumeroj. Tion ni povas do konsideri la kunigitan kolekton "Vanden Bempt - Vanbiervliet".

En 2019 estis lanĉita propono transpreni la bibliotekon kaj fondaĵon Hodler de UEA. En oktobro 2020 la estraro de UEA disponis pri ĉiuj informoj por decido.

C Internacia Esperanto-Arkivo (IEA)

Internacia Esperanto-Arkivo, mallonge IEA, estas fondita en la 22-a de januaro 2021 kaj oficiale aspc (asocio sen profitdona celo) ekde la 25-a de januaro 2021.

La tri administrantoj estas Bert Boon (Tienen), Roland Rotsaert (Brugge) kaj Marc Vanden Bempt (Winksele). La ideo pri IEA ekestis jam komence de la 2000-aj jaroj, sed pliakiviĝis en 2016 post kontaktoj kun japana biblioteko. En oktobro 2019 la plano iĝis pli konkreta; tiam en limigita rondo estis lanĉita la ideo de asocio kaj pluraj eblecoj estis esploritaj. Fine estis decidita fondi asocion senprofitcelan laŭ belga leĝo kaj provizora konservado en propra domo. La baza ideo malantaŭ la kreado de jura persono estas unuflanke krei juran bazon por la kolekto de la Fondaĵo Vanbiervliet kaj aliflanke apartigi la kolekton Marc Vanden Bempt de lia fizika persono. Tra 2020 do estis preparita la fondado de aspc (asocio sen profitdona celo).

II Celoj

La Arkivo celas: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Esperanto kaj planitaj lingvoj, en sia originala formo. Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel heredaĵo, por nelimigita tempodaŭro. Por atingi ĉi tiun celon, la asocio altiras arkivajn dokumentojn diversmaniere. Ĝi provizas medion (posedaĵon aŭ luadon) taŭgan por gardado en optimumaj kondiĉoj koncerne klimaton, sekurecon kaj simile. Detala inventaro de la arkivaj dokumentoj estas daŭre ĝisdatigata. Principe ne disponeblas pruntado, la aliro eblas surloke aŭ per aliaj vojoj, ekzemple skano.

Provizore la Arkivo povas resti en la nuna loko en la centro de Belgio (tuj apud Leuven), sed ĝi serĉas novan ejon konstruitan aŭ konstruotan laŭ la specifaj postuloj por arkiva konservado por eterne.

III Subteno

Ĉiu persono (esperantisto aŭ ne) estas petata subteni kiel AMIKO; MECENATO; AĈETANTO (de brokantaĵoj kaj "BRIKOJ"); eventuale KUNINVESTANTO kaj VOLONTULO (ekzemple por ordigi kaj plivastigi la kolekton). Detalojn vi trovas en la retejo, ĉe arkivo.eu. De via subteno dependas la realigado de la celo!

IL MANIFESTO PER LA TERRA

Il Manifesto per la Terra di Ted Mosquin e Stan Rowe, pubblicato nel 2004 ad opera degli autori è uno dei documenti base dell'Ecologia Profonda.

In questo breve libro bilingue italiano-esperanto con la traduzione di Nicola Ruggiero Il Manifesto per la Terra viene proposto con una prefazione di Guido Dalla Casa e due interventi di Luciano Mazzoni Benoni e Davide Astori, curatori della pubblicazione.



PILLOLE DI SALVEZZA 1088: ESPERANTO-VIVO

Cari lettori

Antonio de Salvo, cosciente della sua grave situazione sanitaria, negli ultimi giorni di vita ha lavorato intensamente per preparare dei contributi per le giornate di aprile, e lo ha fatto fino al 20 aprile. Questa rubrica è sempre stata redatta scegliendo tra il suo materiale, e cercando di variare i contenuti.

Ora ci piacerebbe che qualcuno continui il suo lavoro: chi se la sente, o pensa di poter far parte di un gruppo che porti avanti il lavoro di Antonio, contatti la redazione di NSiR. Grazie fin d'ora.

